La staploj en la arbsegej' atestas niajn agojn.
En l' arbsegej' de Sekvojar' dissegas ni piceojn.
En l' arbsegej' de Sekvojar' ignoras ni paneojn.

La arbsegej' de Sekvojar' difinas nian dignon.
En l' arbsegej' de Sekvojar' ni segas multan lignon.
La arbsegej' de Sekvojar' fajfegas pri regulo.
En l' arbsegej' de Sekvojar' ne restis dekŝingrulo.

En l' arbsegej' de Sekvojar' dissegas ni betulojn.
Pro l' arbsegej' de Sekvojar' ni dankas la praulojn.
En l' arbsegej' de Sekvojar' dissegas ni abiojn,
juglandoarbojn, poplojn kaj piniojn, robiniojn.
En l' arbsegej' de Sekvojar' ni ŝatas segi ulmojn,
produktas en la arbsegej' ni verajn ulmukulmojn.
En l' arbsegej' de Sekvojar' dissegas ni kaŝtanojn.

La arbsegej' de Sekvojar' bezonas nur titanojn.
La arbsegej' de Sekvojar' difinas nian dignon.
En l' arbsegej' de Sekvojar' ni segas multan lignon.
Per ligno el la arbsegej' vastiĝas domvarmego.
Nu, foje en la arbsegej' en membron tranĉas sego.

En l' arbsegej' de Sekvojar' dissegas ni acerojn,
La Francoj kaj Hispanoj jam atendas la liverojn.
En l' arbsegej' de Sekvojar' dissegas ni larikojn
kaj sendas en la Francan kaj Hispanan respublikojn.
En l' arbsegej' de Sekvojar' dissegas ni fraksenojn.
En Hispanujo kaj Francuj' vi trovas specimenojn.
En l' arbsegej' de Sekvojar' dissegas ni platanojn.
Jen servas nia arbsegej' la Francojn kaj Hispanojn.

La arbsegej' de Sekvojar' difinas nian dignon.
En l' arbsegej' de Sekvojar' ni segas multan lignon.
La arbsegej' de Sekvojar' ĝojigas sen piano:
en l' arbsegej' de Sekvojar' por ludi mankas mano.

La arbsegej' de Sekvojar' situas ja en sekvoj-ar',
Se emas mi al segofar' en tiu kaj la sekva jar',
sen navigilo en la ĉar' mi sekvas vojon al l' arbar'.
Nelacigeble sen erar' rapidas mi al Sekvojar'.

La arbsegej' de Sekvojar' difinas nian dignon.
En l' arbsegej' de Sekvojar' ni segas multan lignon.
Labori en la arbsegej' ekscitas pli ol seks'.
Tre belas en la arbsegej'! - Ho, kuŝas jen poleks'.
Esperanto-Übersetzung: Rudolf Fischer

Klerigadsemajnfinoj

GEA-Filio por Klerigado kaj Kulturo en Herzberg
ofertas por vi klerigadsemajnfinojn! Bonvolu
noti kaj varbi por faka kaj organiza klerigado:

14.12.2018 – 16.12.2018 Klerigseminario

01.03.2019 – 03.03.2019 Klerigseminario

28.06.2019 – 30.06.2019 Klerigseminario

Krom Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar nun konstante kunlaboras por GEA-klerigado d-ino Anina Stecay kaj Martin Ptasinski. Ili mem partoprenis la GEA-klerigmodulojn en Herzberg kaj studis interlingvistikon en Poznano.

Unu el la celoj estas produkti por GEA filmserion por klerigado kun didaktikaj, fakaj, kulturaj kaj organizaj filmoj. Iam ankaŭ altnivela klerigado en Esperanto per fakprelegoj aperos ĉe Jutubo. Teknikaj helpantoj estas serĉataj! Plue ni elkonstruos la unikan fakbibliotekon por klerigado. Bv. varbi studemulojn, ĉar la Esperantomovado bezonas kompetentajn fakulojn.



Esperanto-Ligo Malsupra Saksio (EMAS)

Landesverband Niedersachsen im
Deutschen Esperanto-Bund e. V.

Protokoll der Jahreshauptversammlung 2018

Am Sonnabend, 18. August 2018 um 11.00 Uhr
in den Räumen des Vereins CAN ARKADAŞ e.V.,
Münzstraße 3, 30159 Hannover.

Beginn der Jahreshauptversammlung: 11.15 Uhr

1. Feststellung der Beschlussfähigkeit und Wahlen des Schriftführers sowie des Versammlungsleiters

Erschienen sind 13 Mitglieder. Da die Einladungen zur
Jahreshauptversammlung rechtzeitig versandt worden sind, ist
die Jahreshauptversammlung damit beschlussfähig.

Einstimmig und ohne Enthaltungen übernimmt Thomas
Heberlein das Protokoll sowie die Versammlungsleitung.

Da von den Kassenprüfern lediglich Gerhard Weber
erschieden ist, wird einstimmig beschlossen, den TOP 7
(Neuwahl von zwei Kassenprüfern) vorzuziehen.

7. Neuwahl von zwei Kassenprüfern

Die Amtszeit von Dr. Andreas Kück und Frank Merla endet.
Davon ist Dr. Andreas Kück zur erneuten Kandidatur bereit.
Außerdem kandidiert Dr. Klaus Schlüter. Beide werden bei einer
Enthaltung einstimmig gewählt.

Die Amtszeit von Gerhard Weber läuft weiter.

2. Bericht des Vorsitzenden über das Geschäftsjahr 2017

Thomas Heberlein berichtet über die Aktivitäten des
Landesverbandes im Jahre 2017. Höhepunkt war das Rata
Rendevuo 2017 in Hameln, welches die örtliche Gruppe aus
Anlass ihres 30. Jubiläums veranstaltet hat. Diese zweitägige
Veranstaltung ist landesweit und auch darüber hinaus gut
angenommen worden und die Teilnehmer haben sich darüber
sehr positiv geäußert. Thomas Heberlein dankt der örtlichen
Gruppe namens des Landesverbands für die Durchführung
dieser gelungenen Veranstaltung.

Kurz nach dem Rata Rendevuo 2017 ist die Kassiererin
Alke Geveke krankheitsbedingt ausgefallen und nach
mehrmonatiger Krankheit verstorben. Da Alke Geveke die
Arbeit des Landesverbands maßgeblich geprägt habe, sei der
Landesverband praktisch gelähmt gewesen.

Die Anwesenden ehren Alke Geveke mit einem schweigenden
Gedenken.

Auf Grund ihrer Krankheit hat Alke Geveke den
Jahresabschluss für 2017 nicht mehr erstellen können.
Stattdessen hat das der Vorsitzende Thomas Heberlein getan.
Das war möglich, weil keine Barkasse vorhanden ist. Vielmehr
läuft der Zahlungsverkehr des Landesverbands über das Konto
bei der Raiffeisenbank Oldenburg.

Thomas Heberlein berichtet über die Kassenstände am
Beginn des Jahres sowie am Ende des Jahres und zählt die
wesentlichen Vorgänge auf. (Anmerkung: Die Einzelheiten
ergeben sich aus dem anliegenden Jahresabschluss 2017.)

Außerdem berichtet er, dass die Raiffeisenbank Oldenburg
den Landesverband nach dem Tod von Alke Geveke quasi als
neuen Kunden betrachtet und sogar die Verlegung des Kontos
zu einem anderen Geldinstitut angeregt hat. Geplant ist die
Kündigung des bisherigen Kontos und die Eröffnung eines
neuen Kontos bei der Sparkasse Hameln-Weserbergland. Diese
Sparkasse hat in den letzten Jahren immer wieder Esperanto-
Aktivitäten unterstützt.

3. Berichte der Kassenprüfer

Kassenprüfer sind Dr. Andreas Kück, Dr. Klaus Schlüter und
Gerhard Weber. Davon haben Dr. Klaus Schlüter und Gerhard
Weber die Kasse geprüft. Sie berichten, dass wenig Bewegungen
stattgefunden haben und die Kasse in Ordnung sei. Gerhard
Weber schlägt vor, den Vorsitzenden in seiner Eigenschaft als
geschäftsführenden Kassierer zu entlasten.

4. Aussprache über die Berichte unter 2. und 3.

Keine Wortmeldungen.

5. Entlastung des Vorstandes

Gerhard Weber beantragt, den Vorstand insgesamt zu
entlasten.

Der Vorstand wird einstimmig bei einer Enthaltung entlastet.

6. Neuwahl des Kassierers

Einzige Kandidatin ist Lena Eis aus Hannover. Sie ist 29
Jahre alt und mit 14 Jahren erstmals mit Esperanto in Kontakt
gekommen. Sie ist gegenwärtig Beisitzerin im Vorstand. Für den
Fall ihrer Wahl zur Kassiererin tritt sie als Beisitzerin zurück.

Lena Eis wird einstimmig gewählt.

8. Ansetzung der Jahreshauptversammlung 2019

Aus dem Kreis der Anwesenden wird vorgeschlagen, die
Jahreshauptversammlung 2019 im Rahmen des Rata Rendevuo
2019 durchzuführen. Petro Zilvar weist darauf hin, dass jeweils
am letzten Oktoberwochenende der Verbandsrat des Deutschen
Esperanto-Bundes stattfindet. Das sollte bei der Ansetzung der
Jahreshauptversammlungen bedacht werden.

9. Sonstiges

Eva Shkolnykova teilt mit, dass das Rata Rendevuo 2018
voraussichtlich am 31.10.2018 in Paderborn stattfinden wird.

Petro Zilvar und Stefan Krieghoff fragen, wie der
Landesverband Menschen erreichen könne, die im Internet
Esperanto lernen. Lena Eis und Stefan Krieghoff fragen
außerdem nach dem Mehrwert, welchen der Landesverband
bietet. Der Landesverband habe ein Altersproblem. Wie könne
man den Landesverband für jüngere Leute attraktiver machen?

Lena Eis bietet an, Kontakt aufzunehmen mit Chuck
Smith von der Internet-Plattform Duolingo. Zsafia Korody
weist darauf hin, dass Duolingo lokalen Gruppen anbietet,
Veranstaltungen anzukündigen.

Die Seite des Landesverbands auf der Plattform des
Deutschen Esperanto-Bundes enthält bislang lediglich
Kontakt Daten. Vor der Neugestaltung des Internet-Auftritts des
Deutschen Esperanto-Bundes war die Seite des Landesverbands
voll mit Inhalten, welche der Landesverband selbst einstellen
konnte.

Es herrscht Einvernehmen, dass starke Ortsgruppen wichtig sind. Daher soll die neue Seite des Landesverbands unbedingt Inhalte und Links zu den örtlichen Gruppen enthalten.

Die Neugestaltung des Internet-Auftritts soll unter den Aktiven des Landesverbands in einem Forum besprochen werden, z. B. einer Telegram-Gruppe.

Petro Zilvar verweist auf den Esperanto-Kurs des Goethe-Instituts.

Lena Eis weist hin auf das Esperanto-Spiele-Treffen in Hannover vom 19. - 21.10.2018 sowie auf die Esperanto-Bibliothek, welche sich bei dem Ehepaar Weemeyer in Hannover befindet. Dort könne man nach vorheriger Absprache Bücher ausleihen.

Außerdem werden die Esperantisten in Bremen angesprochen. Nach der Auflösung der Bremer Gruppe bemüht sich die Esperanto-Gruppe Unterweser auch um die neu hinzugezogenen Esperantisten in Bremen. Das funktioniert bislang nur teilweise.

Ende der Jahreshauptversammlung: 12.30 Uhr

Fertiggestellt am 22. August 2018

Thomas Heberlein

Esperanto-Instruada Semajnfino, gvidata de Zsófia Kóródy

Vendredo ĝis dimanĉo 16. - 18.11.2018: Zsófia Kóródy: Esperanto-Instruada Semajnfino.

Zsófia Kóródy estas fama, lerta kaj sperta instruistino. Jam dum multaj jaroj ŝi instruas en la Esperanto-urbo Herzberg gelernantojn el la tuta mondo. Antaŭ du jaroj ŝi jam instruis kun granda sukceso por Esperanto



Hamburg. La partoprenintoj petis, ke ŝi revenu kaj nun ŝi akceptis nian inviton. La Esperanto-Instruada Semajnfino okazos en Kulturladen St. Georg, Alexanderstr. 16, 20099 Hamburg.

Vendredo: 17 h Alveno de la partoprenantoj. Prezento de la programo. 18 h Komuna lernado. 20 h Koncerto de Kaŝi, Tanja Heidmann kaj Bo Ĝos.

Sabato: 12 h Komuna tagmanĝo en turka restoracio (je propraj kostoj). 13:30 h La sekretoj de la Esperanto-gramatiko malkaŝitaj. 17:30 h Prelego Zsófia Kóródy. 18:30 h Verspermanĝo. 20 h Koncerto de Tanja Heidmann kaj Ralph Glomp.

Dimanĉo: 10 h Esperanto-gramatiko – demandoj kaj respondoj. 13 h Tagmanĝo en Restoracio (je propraj kostoj), poste adiaŭo.

Esperanto-Ligo Malsupra Saksio (EMAS)
Landesverband Niedersachsen
im Deutschen Esperanto-Bund e.V.

Jahresabschluss 2017

Einnahmen		Ausgaben	
Beiträge individueller Mitglieder 2017	80,00 €	Zuschüsse für Projekte	238,00 €
DEB Globalzuweisung 2017	708,75 €	Kontogebühren	20,10 €
Summe	788,75 €	Summe	258,10 €
Überschuss 2017: 530,65 €			
Kassenbestand am 31.12.2016 (identisch mit Kontoguthaben, keine Barkasse vorhanden)		2.283,59 €	
Einnahmen 2017		788,75 €	
Ausgaben 2017		258,10 €	
Kassenbestand am 31.12.2017 (identisch mit Kontoguthaben, keine Barkasse vorhanden)		2.814,24 €	
Hameln, 20. Mai 2018			
(gez.) Thomas Heberlein (Vors.)			



Aliĝo: info@esperanto-hamburg.de. **Kotizo:** Aliĝo kaj pago ĝis fino de septembro: 20 €, poste 30 €. Tagaj biletoj 10 €. Elkoran dankon. Plej amike,

Ralph Glomp
Esperanto Hamburg e.V., Klaus-Groth-Str. 95, 20535 Hamburg, info@esperanto-hamburg.de

Bonetosa semajnfina lernado apud Sorpesee

De vendredo la 9-a de novembro ĝis dimanĉo la 11-a de novembro 2018.

Ankaŭ ĉi-jare la de multaj jaroj bonkonata kurso denove okazos en la gastema domo de la popola altlernejo en Sundern-Langscheid, en pitoreska ĉirkaŭaĵo apud Sorpesee en la Sauerland-regiono.

Okazos grupo por fluaj parolantoj, gvidata de Harald Schmitz – kaj grupo, gvidata de Martin Brüggemeier por progresantoj. Se venos sufiĉe da komencantoj – ni ja esperas tion – ankaŭ por ili ni organizos grupon.

La kursoj okazos de vendredo (18.00) ĝis dimanĉo (14.00). Ne nur okazos altkvalita kurso en komforte ekipitaj lernĉambroj, ĉirkaŭataj de multkoloraj aŭtunaj arbaroj: La domo prezentas purajn, hejmecajn dormĉambrojn, laŭdezire kun balkonoj kaj elrigardoj al la bela lago. Ankaŭ sufiĉe rapida reta WLAN-ligo ekzistas.



Plie ne mankos bongustaĵoj, kreataj de la komplezemaĵoj kaj agemaĵoj kuiristinoj. Ĉu kun aŭ sen viando, diversaj legomoj aŭ bongustaj salatoj: ĉiuj deziroj estos plenumigitaj.

Vespere oni kunvenos en bonetosa rondo por kanti, rakonti kaj frandi. Laŭ nia ĝisnuna sperto la diligentaj instruistoj ne nur "fumegigos" niajn cerbojn, ili ankaŭ ne forgesos spici la instruadon per ŝercoj, ludoj aŭ malfacilaj enigmoj.

Memkompreneble la kontentaj "lernantoj" ne hezitas partopreni denove ĉi-jare. Sed ankaŭ estas bonega ebleco refreŝigi aŭ pligrandigi la ĝisnunajn Esperantajn konojn. Bonvolu informi viajn amikojn, ke okazos vere agrabla ebleco lerni facilan, bonan kaj belan internacian lingvon.

Organizas: Harald Schmitz, Dohlenweg 2, 50259 Pulheim, retadreso: hschmitzpul@gmx.de. Pliajn informojn: <https://www.vhs-arnsberg-sundern.de/index.php?id=9&kathaupt=11&knr=P-426-191&kursname=Esperanto-fuer-Fortgeschrittene>

Willy Nüesch, 1927 – 2018

Ŝajnas esti mia daŭra sorto, ke tuj post finpretigo de nova kontribuo al *Esperanto aktuell* mi devas modifi kaj aldoni funebrajn informojn. Tiufoje mi eksciis, ke efektive mi forgesis mencii en mia listo de amikoj donacemaj la nomon de Willy Nüesch, kiu forpasis en la aĝo de 91 jaroj la 6-an de Septembro 2018. Willy

donace sendis ofte kaj multe verkon, se li finis traduki ĝin; lian nomon oni trovas 35-foje en nia katalogo. Ni daŭre tenos lian nomon en kara memoro. Li restu en paco!

Utho Maier



† Willy Nüesch, fotita de Stefano Keller en 2006

Anton Kronshage forpasis

En la aĝo de 89 jaroj post sufiĉe longa malsano mortis nia amiko Anton Kronshage la 14-an de julio 2018, hejme en sia loĝloko Schwelm.

Ĝis proksimume unu jaro antaŭ sia morto li preskaŭ ĉiutage estadis survoje, vizitante lokajn Esperanto-renkotiĝojn, inter alie en Wuppertal, Dortmund kaj precipe en Düsseldorf, krome li plenumis multnombrajn internacian korepondadon. Pri Esperanto li interesiĝis jam tre frue en juna aĝo kaj li vizitis Esperanto-kurson, kiam li havis 27 jarojn, li partoprenis kongresojn kaj volonte gastigis Esperanto-amikojn. Li estis dumviva membro de Germana Esperanto-Asocio kaj de Universala Esperanto Asocio. Ekde 1988 li estis membro de ELF/AREK (filatelistoj kaj kolektantoj). Li havis multflankajn interesojn kaj tiel ankaŭ interesiĝis pri Esperantaj filatelo kaj numismatiko. Je multaj okazoj li varbis por Esperanto, interalie per malgrandaj ekspozicioj, ekzemple en vitrinoj en publikaj institucioj, kiel distrikta administrejo, ŝparkaso, biblioteko aŭ lernejo. Apud la informoj li tiam ĉiam prezentis ankaŭ Esperantajn poŝtmarkojn, stampojn kaj monerojn kaj ekspoziciis internaciajn korespondaĵojn. Kune kun sia Esperanto-amiko Heinz Schindler li iniciatis, ke en Schwelm du stratoj estis nomitaj "Zamenhofweg" kaj "Esperantoweg". Ripozu li en Paco.

La nekrologon verkis Wolfgang Loose

Intertempe mortis ankaŭ la edzino Agnes kaj estis entombigita la 1-an de Oktobro.

<p>Geheimnis des Glaubens im Tod ist das Leben.</p>	<p>Mistero de la fido en la morto la vivo. - Esperanto -</p>
<p>Im Glauben an seinen Schöpfer und Herrn entschlief heute mein lieber Mann, unser herzensguter Vater, Schwiegervater und Opa</p>	
<div style="display: flex; align-items: center; justify-content: center;"><div style="font-size: 4em; margin-right: 10px;">+</div><div style="text-align: left;"><h2 style="margin: 0;">Anton Kronshage</h2><p style="margin: 0;">* 14. April 1929 † 14. Juli 2018</p></div></div>	
<p>In Liebe und Dankbarkeit Agnes Kronshage geb. Müller Alfred Pater Johannes Maria Dr. Andreas Kronshage und Sonja Nitsche mit Jonah Ulrich und Rita Wenzel geb. Kronshage mit David, Katja und Jan und Anverwandte</p>	
<p>58332 Schwelm, Eulenweg 27 Das Seelenamt halten wir am Montag, den 23. Juli 2018 um 9.00 Uhr in der Propsteikirche St. Marien, Schwelm. Die Trauerfeier mit der anschließenden Beisetzung findet am selben Tag um 10.00 Uhr in der Trauerhalle des Friedhofes Schwelm-Oehde statt.</p>	

Europa, Demokratie und Esperanto zur Wahl bringen

2019 wählen die Bürgerinnen und Bürger der Europäischen Union zum neunten Mal das Europäische Parlament. Seit 2003 war Europa Demokratie Esperanto dabei. Drei Mal in Frankreich 2004, 2009, 2014 und ein Mal in Deutschland 2009.

Mit wenig Menschen und viel Einsatz wurden in Deutschland für 2009 mehr als 4000 Unterschriften gesammelt um E-D-E auf den deutschen Wahlzettel zu schreiben. Ein starkes Zeichen!

2014 gab es nur ein schwaches Zeichen, eigentlich kein Zeichen aus Deutschland und ein starkes Zeichen aus Frankreich.

Wir wissen, dass in Deutschland die Esperanto-Gemeinschaft schwere Zeiten durchlebt. E-D-E bewegt sich in Frankreich, bewegen wir uns mit! In Deutschland ist von allen EU-Staaten die Teilnahme-Hürde am niedrigsten.

Alle fünf Jahre sieht die Welt Stärke und Schwäche der Esperanto-Gemeinschaft.

Menschen die sich für Europa Demokratie Esperanto erwärmen, sollten aktiv sammeln. E-D-E braucht Unterstützungsunterschriften und die Esperantisten in Deutschland brauchen Bewegung.

Die Pro-Europäer sind überall lauter geworden. Auch für uns ist es Zeit, für die gemeinsame Zukunft zu kämpfen.

Wer leise ist, wird nicht gehört.

Ich bin überzeugt: Wir Europäer brauchen Esperanto für



das Zusammenwachsen, und die Zukunft mit Esperanto in Europa heißt E-D-E.

Nehmen wir die Chance der Europa-Wahl wahr, uns als Esperantisten einzubringen.

de.e-d-e.eu, Konrad Gramelspacher, Dorfstraße 25
79219 Staufen-Grunern, T. 07633-802518, kg@e-d-e.eu

Kunveno de landaj ligoj kaj fakaj asocioj (Verbandsrat), Herzberg/Harz, 27-a de oktobro

Estas tradicio ke la estraro de GEA ĉiun aŭtunon kunvenas kun reprezentantoj de ĝiaj membroasocioj kiel „Verbandsrat“ laŭ para. 9 de la statuto.

Tio estas la ĉefa kunveno de la asocio inter la Germanaj Esperanto-Kongresoj. Bonvenaj estas ne nur la formalaj reprezentantoj de landaj ligoj kaj fakaj asocioj, sed ankaŭ aliaj aktivuloj. En ĉi tiu jaro la aŭtuna kunveno de GEA okazos sabaton, la 27-an de oktobro denove en la urba biblioteko de Herzberg/Harz (adreso: Am Spritzenhaus 11). Oni rekomendas alveni jam vendredon vespere: partoprenantoj kolektiĝos en la biblioteko je la 19:00h kaj iros komune vespermanĝi.

La formala kunveno komenciĝos sabaton, la 27-an de oktobro je la 9:00h. Je la 11:30h oni interrompos la kunvenon por komuna veturado al la kastelo Welfenschloss. Kune kun reprezentantoj de la urbo tie okazos la malfermo de ekspozicio pri la ĝemelurbaj rilatoj inter Herzberg kaj Góra (Pollando), en kiuj Esperanto ludas gravan rolon, kaj eblos viziti grandan ekspozicion pri Tibor Sekelj. En la restoracio de la kastelo estas rezervitaj lokoj por posta tagmanĝo.

Je la 14:30h oni daŭrigos la kunvenon en la urba biblioteko per neformala diskuto i.a. de jenaj temoj: (1) aktualaj informoj el nia informaj publikrilata laboro (Lu von Wunsch-Rolshoven), (2) katalogigo de la bibliotekoj de lokaj grupoj (Barbara Brandenburg) kaj (3) retpaĝoj de GEA kaj ĝiaj membroasocioj (Franz Kruse kaj Julia Noe). La menciitaj gekolegoj nur mallonge enkondukos la temojn: restu sufiĉe da tempo por interŝanĝo de spertoj. Je la 19:30h estas antaŭvidata komuna vespermanĝo.

Bonvolu anonci vian partoprenon al wolfgang.bohr@esperanto.de, Tel. (0800) 3363636-5114.



Entwurf

Deutscher Esperanto-Bund e.V.

Sitzung des Verbandsrats am Samstag, dem 27. Oktober 2018 in Herzberg am Harz

Tagesordnung

1. Annahme der Tagesordnung
2. Wahl eines Protokollführers
3. Bericht des Bundesvorstands (u.a. Mitgliederverwaltung, Archivierung)
4. Bericht des Kassenwarts
5. Vorschau auf geplante Veranstaltungen des D.E.B. (u.a. Luminesk' 2018/2019, PSI 2019, Deutscher Esperanto-Kongress [D.E.K.] 2019, PSI 2020, D.E.K. 2020)
6. Entscheidung über Ort und Zeitpunkt des D.E.K. 2020
7. Datenschutzordnung des Deutschen Esperanto-Bundes
8. Berichte aus den Landes- und Fachverbänden, insbes. Vorschau auf geplante Veranstaltungen
9. Verschiedenes

Helpo bezonata: katalogado de Esperanto-libroj

Ni planas instali komunan katalogon de la libroj de landaj ligoj aŭ lokaj grupoj. La komencon de la katalogo vi povas jam rigardi ĉe www.bibkat.de/de

Do kiamaniere via grupo povas kontribui al la katalogo? Estas sufiĉe simple: se vi jam havas propran katalogon en Excel-formato, tiam simple sendu ĝin al barbara.brandenburg@esperanto.de (eble kun noto kiom da libroj estas). Mi prilaboros la datenojn kaj metos en la grandan katalogon. De tie ili iras rekte al nia katalogo en interreto.

Se vi havas alian formaton, tiam provu eksporti en Excel-formato kaj ankaŭ sendu la datenojn. Se tio ne eblas, bonvolu skribi al mi.

Se vi ankoraŭ tute ne komencis katalogadi viajn librojn, tiam vi povas de mi senpage ricevi programon, kiu estas kompatibla kun nia biblioteka programo en la oficejo. Tiam estas tute simple sendi la datenojn al mi, ĉar vi ĉiam nur eksportas en biblioteka formato, sendas kaj mi povas tuj importi la katalogaĵojn. Mi atendas vian kunlaboron!

Dum unu semajno ni havis tre kapablan helpon por la katalogado de la libroj el la remizo de Katzbachstraße.

Tiuj libroj estas preparataj por transdonado al Staatsbibliothek Berlin kaj krom tio estis la komenco de la komuna interret-katalogo de GEA. Louise Berthoumeyroux el Francio momente praktikumas ĉe EsperantoLand kaj ege kapable helpis en nia laboro. Dankon, Louise! **Barbara Brandenburg**



Festschrift für den Historiker Dr. Ulrich Lins zum 75. Geburtstag

Veröffentlicht von Cyril Brosch am Aug 15 2018.

Am 4. August 2018 beging unser langjähriges Mitglied Ulrich Lins seinen 75. Geburtstag. Ulrich Lins hat sich durch seine Werke zur Geschichte des Esperanto große Verdienste erworben. Sein Hauptwerk ist das Buch „La Danĝera Lingvo“ (Die gefährliche Sprache) (1988) über die Verfolgung von Esperanto-Sprechern unter Hitler und Stalin, das in zahlreiche Sprachen übersetzt wurde. Kürzlich erschien eine von Humphrey Tonkin übertragene englische Ausgabe auf der Grundlage der 2016 überarbeiteten Fassung..

Aus Anlass des Geburtstages erschien eine 710-seitige Festschrift mit 32 Beiträgen, die sich vor allem mit Aspekten der Geschichte des Esperanto beschäftigen, an der auch einige GIL-Mitglieder mitgewirkt haben (vgl. Inhaltsverzeichnis):

En la mondon venis nova sento. Festlibro por la 75-jariĝo de Ulrich Lins. Eldonita de Hitosi Gotoo, Goro Christoph Kimura kaj José Antonio Vergara. New York: Mondial.

Inhaltsverzeichnis:

Gotoo Hitosi: Enkonduko: Pri D-ro Ulrich Lins, kun speciala atento al lia ligo kun Japanio en fruaj jaroj.

Renato Corsetti: Esperanto: lingvo nur principe ĝena por kapitalistoj kaj imperiistoj.

Nikola Rašić: Ĉu vere danĝera lingvo? – Ulrich Lins kaj la historio de la futuro.

Christian Lavarenne: Ĉu lingvo danĝera por la aliaj? La enigmo de la “ŝtelista lingvo”.


Paul Signoret: Lingvo danĝera, ĉu ankaŭ por ne- aŭ mal-samideanoj? aŭ: Ĉu daŭre nia standardo restas “de sangverŝoj pura”?

Thomas Bormann: La danĝeraj lingvo-uzantoj – kiel la sekreta servo de GDR observis esperantistojn.

Ján Vajs: Slovakaj esperantistoj kaj ŝtata sekreta polico dum socialismo.

Vladimir Samodaj: Esperanto-movado en Soveta Unio en la dua duono de la 20-a jarcento.

Carlo Minnaja: Germanoj kaj japanoj en la unuaj tridek jaroj de la lingvaj institucioj.



Davide Astori: Giovanni Peterlongo, la Trenta esperantista urbestro.

Bernhard Tuidar: “Kiel vi vidas, via incito lerni Esperanton ne estis vana.” Alfred Hermann Fried (1864-1921) kaj lia rilato al Esperanto.

José Antonio del Barrio: Serĉe de la valizo de Mangada.

Ziko van Dijk: Stettler kaj Jakob – antisemitoj en la koro de UEA.

Usui Hiroyuki: Esperanto por Kita Ikki: ĉu unu el la paradoksoj de homo paradoksa?

Tanaka Kacuhiko: La soveta lingvistiko kaj esperantisto Oosima Yosio.

Fritz Wollenberg: La kuraĝulo el Neuruppin. Ludwig Schödl – elstara germana esperantisto kaj pedagogo kun civitana kuraĝo.

Kimura Goro Christoph: Isiga Osamu – kristana esperantisto kiu proponis “Orientan Esperanton”, tradukis Lagerlöf kaj rifuzis militservi.

Bernd Krause: La “Kvina” de Chatauqua – Kronologio de universala kongreso, kiu neniam okazis.

Javier Alcalde: Tri Esperantaj projektoj de Silvio Gesell.

Geoffrey Greatrex: Imperiestroj kaj orientaj militkampanjoj.

So Gilsu: Azia movado en la komenco (1965~1995).

Heidi Goes: Influo de politikaj cirkonstancoj je la Esperantomovado en Indonezio.

Mikaelo Bronŝtejn: Stratnomoj kun rilato al Esperanto en Kazano (Tatarstano).

Guilherme Fians: La Kosmopolito kaj la Aliulo: Historiaj konsideroj pri diferenco kaj diverseco laŭ la vidpunkto de esperantistoj.

Leif Nordenstorm: Leo Tolstoj kaj lia influo al la idearo de Esperanta komunumo.

Hektor Alosi Font: Esperantistoj kaj lingva kaj nacia emancipiĝo antaŭ la Dua mondmilito.

Humphrey Tonkin: Esperanto kaj monda literaturo.

Kadoja Hidenori: Sociolingvistika Lokigo de Esperanto – de lingva rajto al informogaranto.

Miroslav Malovec: Pri prestiĝo de lingvoj.

Jens Stengaard Larsen: La lingvokritiko de Frederik Dreier.

Věra Barandovská-Frank: Conlangs: ĉu studobjekto de interlingvistiko?

Gonçalo Neves: Japanio kaj la latina.

Sabine Fiedler

Quelle: <http://www.interlinguistik-gil.de/wb/pages/posts/festschrift-fuer-den-historiker-dr-ulrich-lins-zum-75.-geburtstag-36.php>

def: Nova reta vortaro

De somero 2018 ekzistas nova germana-Esperanta vortaro en TTT. Ĝi estas atingebla per la adreso <http://def.fontoj.net/> kaj nomiĝas "Deutsch-Esperanto-Finder" (germana-esperanta trovilo), mallonge "def" (daŭrigo de "abcĉ").

Respondecas pri la vortaro Albrecht Kronenberger, interalie kunaŭtoro de la ekumena diserva libro ADORU kaj kunredaktoro de la biblio-eldono 2006. Li baziĝas sin sur la Vortaro *Online* de Thomas Schütz kaj aldonis multe da materialo, interalie proverbojn, la nomojn de ĉiuj konstelacioj kaj de multaj plantoj kaj bestoj, la enhavon de *Kleines Wörterbuch* de Ulrich Matthias kaj Dietrich Weidmann kaj de la *Ekoturisma Vortaro* de Zdeněk Pluhař kaj aliaj. Detaloj legeblas en la postparolo (*Nachwort*) fine de la vortara paĝo.

La vortaro nun ampleksas pli ol 93 000 kapvortojn, kiuj aperas en listo alfabeto ordigita laŭ la germana lingvo. Deziro de Albrecht Kronenberger estis komputila serĉilo, kiu funkciis sen retkonekto surbaze de unu sola dosiero. En la Trilanda Esperanto-Kongreso de 2018 en Zweibrücken li trovis profesian evoluigiston de ret-aplikaĵoj, kiu pretis krei tian serĉilon. Nun eblas serĉi unuope aŭ kombine tra jenaj partoj de la vortaro:


- germana flanko
- Esperanta flanko
- latinaj nomoj de plantoj kaj bestoj
- fako (ekz. "Theater" aŭ "Biochemie")
- klariga teksto (ekz. "Verwaltungsbezirk" ĉe la kapvorto "Abasinischer Rajon")

Eblas serĉi aŭ kompletajn vortojn aŭ vortopartojn kaj distingi aŭ ne inter minuskloj kaj majuskloj ("uskleco"). La listigitaj kvin specoj de informoj estas tipografie facile distingeblaj; parto de la vortoj montras ankaŭ sian fonton, ekzemple "ZProv" (zamenhofa proverbaro) aŭ "PIV". Ĉar la serĉilo ne bezonas retkonekton, la serĉado estas tute anonima; neniu povas vidi aŭ registri la serĉatajn esprimojn.

Retgastiganto de la vortaro estas la retportalo Kristanaj Fontoj (Albert Josef Urban, Liturgisches Institut Trier). La vortaro estas libere uzbla rete aŭ eĉ ŝutebla por loka uzo.

Renardo Fössmeier

Suchergebnis:
Pfefferminz n, Pfefferminzlikör m Essen und Trinken pipromenta likvoro
Pfefferminz n, Pfefferminzbenben n Essen und Trinken pipromenta borbono
Pfefferminz ohne Ährkel, Pfefferminzgeschmack m, der Aromastoff der Pfefferminze n Essen und Trinken pipromento
Pfefferminze f (Mentha > pipreta) Botanik Pflanzenshybride in der Familie der Lippenblüter pipra mento, auch: pipromento
Pfefferminze f Botanik allgemeine pipromento, pipra mento
Pfefferminzöl n Pharmazie pipromenta oleo
Pfefferminzpastille f Pharmazie pipromenta pastelo, pipromenta lozengo
Pfefferminztee n Essen und Trinken infuzajo de pipromento Kraut, pipromenta infuzajo, piproment-infuzajo



Ausführliche Sprachlehre des Esperanto von Hermann Göhl jetzt als E-Book erhältlich

Die im Jahr 1932 erschienene "Ausführliche Sprachlehre des Esperanto" von Hermann Göhl kann bis heute als die umfangreichste und detaillierteste Grammatik des Esperanto in deutscher Sprache angesehen werden.

Auch wenn das Buch nicht mehr in jeder Hinsicht dem aktuellen Gebrauch der Sprache und heutigen Ansichten zur Grammatik entspricht, beschreibt es doch die Feinheiten der Sprache verständlich und umfassend und ermöglicht dem Anfänger wie dem fortgeschrittenen Teilnehmer am Esperanto-Kursus, fundierte Kenntnisse über das Esperanto zu erhalten. Auch Kursusleiter, Lehrbuchautoren, Übersetzer und Lexikografen finden hier eine Fülle von Hinweisen, Formulierungen und praktischen Übersetzungsbeispielen.

Das 300 Seiten starke Buch konnte zur damaligen Zeit nur durch eine großzügige Spende gesetzt und in den Druck gebracht werden. Der auch als Verfasser von Lehrbüchern bekannte Autor erlebte das Erscheinen seines sicher wichtigsten Werkes nicht mehr. Zwei fotomechanische Nachdrucke erschienen 1973 und 1989 in Berlin.

Die Sprachlehre ist jetzt exklusiv als Kindle-E-Book bei Amazon erschienen (<https://www.amazon.de/dp/B07GB7329K/>).

Der Text der Originalausgabe und damit auch die Rechtschreibung wurden unverändert übernommen, das Layout mit dem Ziel einer besseren Lesbarkeit und Übersichtlichkeit neu gestaltet. Die Zahl der nach Texterkennung und Korrektur verbliebenen Druckfehler ist erfreulicherweise gering.

Als Besonderheit benutzt die Sprachlehre keine Seitenzahlen, sondern eine Abschnittsnummerierung. Sowohl das Inhaltsverzeichnis als auch das Sach- und



La verkisto Clemens Setz aprezas Esperanton

La konata aŭstra verkisto Clemens Setz (naskita en 1982 en Graz) prelegis laŭ invito de la Lyrik Kabinett München (Liriko Kabineto Munkeno) la 12-an de junio 2018.


La temo estis: “William Auld: Majstro de la malnova mondlingvo Esperanto”. La skoto William Auld (1924 – 2006) estas rigardata kiel unu de la plej gravaj Esperanto-verkistoj. Li skribis tre grandan nombron da Esperantaj poemoj. Trifoje li estis proponata por la Nobel-premio pri literaturo.

Clemens Setz legis poemojn el kelkaj libroj de Auld, ekzemple “La infana raso”, “Humoroj” kaj “En barko senpilota”. Tuj poste li prezentis siajn germanajn tradukojn. La lasta teksto estis “Mortanta folio”, la plej ŝatata poemo de sinjoro Setz. Li nomis Esperanton “lingvo, kiu delogas fari poemojn”. Tre rimarkinda estis por la preleganto, ke ekzistas denaskaj parolantoj kaj mond vasta reto inter la esperantistoj. Li diris, ke Esperanto estas “mirindaĵo, magia afero”.

Clemens Setz ricevis grandan aplaŭdon de la 20 aŭskultantoj pro la interesa prelego. Fine Uli Ender, la prezidanto de Esperanto-Klubo Munkeno, transdonis kiel donacon sep librojn al la direktoro de Liriko Kabineto. La dua plej granda referenca biblioteko en Eŭropo, kiu specialigis pri liriko, nun la unuan fojon povas oferti ankaŭ verkojn en Esperanto.

Indiko: En oktobro la prelego aperos libroforme (titolo “Ein Meister der alten Weltsprache. William Auld“, eldonejo “Das Wunderhorn”).

Norbert Gütter,
Esperanto-Klubo Munkeno



Wortverzeichnis verweisen deshalb im gedruckten Original wie auch im E-Book nicht auf Buchseiten, sondern auf die Nummern der Abschnitte. Ebenso wird im Text vielfach auf diese Nummern verwiesen. Die elektronische Ausgabe hat die Nummerierung übernommen und vollständig verlinkt. Und – selbstverständlich – kann man Wörter und Begriffe im gesamten Text vom Leseprogramm beziehungsweise -gerät suchen lassen.

Göhl, Hermann: Ausführliche Sprachlehre des Esperanto: Lehr- und Nachschlagewerk für Fortgeschrittene. Amazon: 2018. ASIN: B07GB7329K. **Michael Lennartz**

Nachtrag: Weitere E-Books zum Lernen und Lehren des Esperanto sind das ebenfalls bei Amazon erschienene Lehrbuch “Grundlagen des Esperanto” von Theodor Wittenberger, das „Wörterbuch Esperanto Esperanto-Deutsch Deutsch-Esperanto“ von Andreas Kück sowie die kostenlosen, im epub- und im Kindle-Format erschienen Bücher “Der Esperanto-Lehrer” von Hans Dahmen, “Essen und Trinken auf Esperanto” von diversen Autoren und “Mehrsinnige deutsche Wörter in Esperanto” von Karl Loy (alle im Download bei <http://www.majkel.de>).



AMO-Seminario en Lisbono

La 50-a AMO-seminario okazis dum la 103-a Universala Kongreso en Lisbono.

AMO signifas Aktivula Maturigo, ĝi estas programo de Universala Esperanto Asocio, kiu celas altiĝi la konojn kaj kapablojn de siaj aktivuloj tra la mondo. Ĝi okazas kutime paralele, aŭ sinsekve dum alia Esperanto-aranĝo. La nuna AMO-seminario estis gvidata de Stefan Macgill, vizprezidanto de UEA. La seminario estis malferma al la publiko, partoprenantoj estis plejparte aktivuloj el la landaj asocioj. Oni diskutis pri diversaj temoj, komencinte per la demando, kiu estu la ĉefa mesaĝo de UEA al sia membroj kaj pro kiaj kialoj esperantistoj pretas pagi por membreco en UEA. Oni diskutis pro idealismuloj kaj praktikoj kaj siaj diversaj motivoj esti la membro. Idealismuloj kutime iĝas membroj por montri sian apartenon al la movado. Praktikuloj kutime ŝatas uzi la rabaton dum aranĝoj kaj la servojn de UEA. Rob Moerbeek, iama biblioteka oficisto de UEA, menciis kiel ekzemplon la



oferton de libroj en la Centra Oficejo. Dennis Keefe supozas pli altan socian staton kiel kialon por membriĝo. La aŭskultantaro proponis aŭtomatan remembrisilon, por ne havi la administran okupon ĉiujare. Por la junulara agado prezentis i.a. Francesco Maurelli kelkajn projektojn, kiuj estis sukcese subvenciitaj de Eŭropa Unio. La flegadon de regulaj rilatoj al aliaj junularaj asocioj oni vidis kiel gravan rimedon por daŭripava agado. La pli rapidan generacian ŝanĝon de aktivuloj kompare kun UEA oni vidis kiel grandan problemon. Sukcesa estis la intenco varbi uzantojn de la reta platformo Amikumu por la movado. La landaj asocioj kaj fakaj grupoj estis la sekva tagorda punkto. La ĉeestantoj vidas AMO-seminaron kiel bonvenindan ilon por inviti ilin al nacia kongreso. Fine de la seminario oni diskutis pri la rolo de la Esperanto-revuoj. La diskutantaro konsentis, ke ankaŭ en tempo de digitaliĝo la revuoj havas gravan rolon. Homoj tamen ŝatas havi paperan version por ilin hejme stoki kaj konservi, krome papera versio bone taŭgas por varbado publike.

Andreas Diemel

Kvara Luminesk' okazos en Königswinter

La kvara (do jam tradicia) silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio okazos inter la 27-a de decembro 2018 kaj la 3-a de januaro 2019 en la urbeto Königswinter ĉe la Rejno.

Luminesk' denove ofertas varian programon kun paroliga kurso, prelegoj kaj diskutgrupoj, ekskursoj kaj distraj programoj. La duan fojon estos organizata kuir-konkurso. Ĉefa celgrupo de la renkontiĝo tradicie estas esperantistoj pli aĝaj ol 35; kutime ili venas el 7-8 landoj. La organiza teamo restis la sama kiel lastfoje en Haltern: Andreas Diemel, Alfred Schubert kaj Barbara Brandenburg. Yoshie kaj Dieter Kleemann kiel en la pasintaj jaroj organizos la vesperan "gufujon" kun teo kaj keksoj.

Königswinter estas facile atingebla per aŭtoŝoseo kaj publikaj trafikiloj (fervojo kaj tramo); la plej proksima ĉefstacio estas Bonn. Situantaj en bela pejzaĝo inter Rejno kaj la montaro Siebengebirge, Königswinter havas longan tradicion de ekskurs- kaj ferioloko. Al Bonn ligas ĝin i.a. tramlinio kaj pramŝipo; sur la apudan monteton Drachenfels kondukas dentorata fervojeto. Planataj estas ekskursoj en la proksiman ĉirkaŭaĵon kaj al Bonn, la iama ĉefurbo de Federacia Respubliko Germanio. Bonn (naskiĝloko de

Beethoven) havas longan universitatan tradicion. Ankaŭ post foriro de la registaro ĝi restas administra kaj politika centro i.a. por pluraj suborganizoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Luminesk'-kunveno estas la JUFA-hotelo Königswinter en la naturparko Siebengebirge, iom super la urbeto. Ĝi apartenas al ĉeno de junularaj hoteloj, jam konata al partoprenintoj de Internaciaj Festivaloj en Nördlingen kaj Jülich. Kunvenĉambroj, restoracio kaj trinkejo troviĝas en la domo.

La kotizoj restas senŝanĝaj kompare al la pasinta Luminesk': por aliĝantoj antaŭ la 15-a de aŭgusto 365 Eŭroj, antaŭ la 31-a de oktobro 385 Eŭroj, kaj poste 399 Eŭroj. Tiuj kotizoj inkluzivas la restadon de la 27-a de decembro vespere ĝis la 3-a de januaro matene (loĝadon en komfortaj dultitaj ĉambroj, tri manĝojn tage, programon kaj silvestran bufedon). Unulitaj ĉambroj estas haveblaj kontraŭ krompago de 15 Eŭroj po persono kaj tago. La kostoj de la tuttagaj ekskursoj estas pagendaj aparte; detaloj sekvas. Personoj loĝantaj en Germanio, kiuj ne estas ordinaraj membroj de GEA, krompagu 30 Eŭrojn. Eblas partatempa ĉeesto je kotizo aparte kalkulita. Aliĝante bonvolu informi, de/ĝis kiam vi intencas partopreni.

Reta aliĝilo estas trovebla ĉe luminesk.de. Aliĝo validas kun antaŭpago de 50 Eŭroj al jena konto de Germana Esperanto-Asocio ĉe Sparkasse Odenwaldkreis: IBAN: DE53 5085 1952 0040 1158 42, BIC: HELADEF1ERB. Eblas ankaŭ pagi al la UEA-konto geaa-n. Sur la ĝirilo indiku "Luminesk 2018 Königswinter" kaj vian nomon.

Aliĝojn ankaŭ akceptas la oficejo de Germana Esperanto-Asocio, adreso: Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin, telefono +49 30 5106 2935, retadreso sibylle.bauer@esperanto.de.

Andreas Diemel

Kalendaro

Oktoebro 2018

12 - 14: Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, ĈEA, en la urbo Benešov, Ĉeĥio. Pinta aranĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun labora traktado, temaj seminarioj kaj programoj ekskursiva, kultura kaj amuza. Organizas: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Náměstí Míru 81/1, Svitavy, CZ-568 02, Ĉeĥio. Retadreso: cea@esperanto.cz

12 - 14: Esperanto-Seminario de BAVELO en Heidelberg, Germanio. Esperanto-seminario kun kursoj de Esperanto de A1 ĝis B1. Por Esperanto-parolantoj okazas "bukeda kurso". En ĝi estas prezentataj kaj diskutataj aktualaj temoj el diversaj fakterenoj. Ekzemple: "Kiel plibonigi la komunikadon inter malbonaŭdantoj kaj bonaŭdantoj?" (kun Alois Eder); "Ruslando estas nia najbarlando" (kun Ulrich Brandenburg, emerita ambasadoro de Germanio en Ruslando kaj ekde 2017 prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio); "La tragedio en DR Kongo. Fono de la Afrika Mondmilito" (kun Manfred Westermayer kaj Alois Eder). Organiza adreso: estraro de BAVELO, Alois Eder, Grabenstraße 63 A, DE 71116 Gärtringen, Germanio. retadreso: aloiseder@arcor.de

13 - 14: Esperanto-staĝo en Parizo. Bonvenas tiuj, kiuj ne scipovas la francan, ĉar Cseh-metode la staĝon gvidos Thierry Saladin (diplomita Cseh-instruisto). Organizas: FFEA, Franca Fervojista Esperanto-Asocio, AFCE/FFEA, 9 rue du Château-Landon, 75010 Paris. Retadreso: sylviane.lafargue@outlook.fr. Inf: thierry_saladin@yahoo.fr

18 - 21: KAEST: Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko en Modra-Harmónia, Slovakio. Ĉi-jare KAEST festas sian 40-jariĝon! La evento unuafoje okazis en la jaro 1978 (en la urbo Žilina). Ĉeftemo de KAEST-2018 estas: Evoluo de paradigmoj en scienco kaj tekniko. Inf.: E@I, rete: kaest@ikso.net

19 - 21: LUDOVIKO – nova, simpla, semajnfina Esperanto-renkontiĝo por ludemuloj kaj/aŭ kreemuloj, kiu okazas en la kvartalo List en la urbo Hanovro en Germanio. LUDOVIKO = LUDaDO kaj Via Individua KreemO. Organiza adreso: carolinverena@gmail.com

19 - 21: Esperanto-studsemajnfino en Bornerbroek, Nederlando. Dum la semajnfino okazos diversnivela Esperanto-lecionoj. Organizas: Esperanto Nederland, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen. Retadreso: studsemajnfino@esperanto-nederland.nl

20. FAME-premio en Aalen (Germanio). Sabate vespere 18h la FAME-Fondaĵo transdonos la Esperanto- Kulturpremion de Aalen al Ilona Koutny. <http://esperanto.bw.de/kalender>. Pliaj informoj ĉe espbib@mail.de; Ursula.Niesert@esperanto.de, telefono: +49761289299.

Novembro 2018

02 - 04: Klač-Kunveno Post-Somera, KKPS en Hunsel, Nederlando. Ĉu vi rajtas nomi vin esperantisto, se vi neniam ĉeestis la Klač-Kunvenon PostSomera? Evidu tiun filozofian demandon por tuj aliĝi al la moĝosa aŭtuna kunveno de la Nederlanda Esperanto-Junularo. KKPS en 2018 okazos en Bekerhof en Hunsel, preskaŭ ĉe la belga landlimo kaj bone atingebla per publika transporto. La programo konsistas el halovena balo, koncerto, ekskurso, kursoj kaj prelegoj. La grupdomo havas luksajn sofojn, trinkejon, sportkampojn kaj fajroploacon. La vilaĝo Hunsel havas nenium interesajn. Organizas: Nederlanda Esperanto-Junularo, retadreso: kkps.klackunveno@gmail.com

03: Aŭtuna Najbara Aranĝo, Halle-ANA, en Halle (Saale)

Germanio. Rendevuejo kaj babilado 10 - 12 h en oficejo Linker Laden, Leitergasse 4, eniro Geiststrasse. Tagmanĝo 12.30 h en bistro de MDR Salzgrafenplatz. 13.30 h vizito de historia lerneja urbo Francke Stift. 16 h komuna kantado kun Esperanto-koruso en halo de la ĉefstacidomo. 17 h fino de aranĝo. Organizas: Esperanto-grupo Panorama Halle (Saale), Hans-Joachim Gunkel, Voss Str. 7, D-06110 Halle, Germanio, retadreso: HajoGunkel@t-online.de

09 - 11: BAVELO-estrarkunsido kun Zamenhof-festo en Villingen-Schwenningen (Germanio). <http://esperanto.bw.de/kalender>. Pliaj informoj ĉe Ursula.Niesert@esperanto.de, telefono: +49761289299

16 - 18: Esperanto-Instruata Semajnfino en Hamburgo (Germanio). Instruos Zsófia Kóródy, kun Koncertoj de Kaŝi, Tanja Heidmann, Ralph Glomp kaj Bo Ĝos. Aliĝo: info@esperanto-hamburg.de

17 - 18: Internacia Radioamatora Konkurso de ILERA – ekde 00:00 horo la 17-an de nov. ĝis 23:59 la 18-an de nov. – en ĉiuj radioamatoraj bendoj plus Echolink. Estas rekomendite uzi la Esperantajn frekvencojn: 3.766 MHz, 7.066 MHz, 14.266 MHz, 21.266 MHz kaj 28.766 MHz. Pliaj informoj ĉe ILERA, Internacia Ligo de Esperantistaj Radioamatoroj, Hans B. Welling, zum Ortenbrink 42, DE-49205 Hasbergen, Germanio - radioonde DJ4PG, interrete: dj4pg@t-online.de

Decembro 2018

08: Zamenhoffesto en Vieno, Aŭstrio. Prelegoj interalie de Chuck Smith, la fondinto de Amikumu. Organizas: Aŭstria Esperanto-Federacio kaj la Pola Instituto en Vieno. Retadreso: aef@esperanto.at, <http://www.esperanto.at>

09: Zamenhof-festo en Stuttgart, Germanio. Rete: <http://esperanto.bw.de/kalender>. Pliaj informoj ĉe Ursula.Niesert@esperanto.de, telefono: +49761289299

14-16: 19-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko, Pollando. Organizas: Bjalistoka Esperanta Societo. Retadreso: pwierzowski@gmail.pl, <https://espero.bialystok.pl/19-aj-bjalistokaj-zamenhof-tagaj/>

14-16: Studsemajnfino: 83-a GEA-Studsesio en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo, Germanio. Studsemajnfino: 83-a GEA-Studsesio, modulo pri Esperanto-literaturo, historio, movado, organizado, varbado. 15.12.2018: 19:00h tradicia Zamenhof-festo. Organizas: Esperanto-Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg am Harz, Germanio. Retadreso: <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=42117099>, esperanto-zentrum@web.de

15: Zamenhoftago en Hago, Nederlando. Priskribo: La 15-an de decembro en la sidejo de Internacia Esperanto-Instituto en Hago/Nederlando okazos Zamenhoftago. Ĉiu estas elkore bonvena. Ni precipe strebas al la ebleco, ke la partoprenantoj povu paroli Esperanton. Organizas: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag Nederlando. Rete: <http://www.iei.nl/ieieo01.htm>, iesperanto@versatel.nl

27 dec - 03 jan: LUMINESK' – la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio en Königswinter/Germanio. Demandoj ĉe Andreas Diemel: demandoj@luminesk.de, aŭ telefone +49 203 2964 877

27 dec - 03 jan: La 17-a Novjara Renkontiĝo en Wiesbaden/Germanio. Informoj ĉe <http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#nr>

28 dec - 04. jan: 10-a Jarfina Esperanto-Semajno JES en Storkow apud Berlino, en Germanio. Organizas: Germana Esperanto-Junularo, retadreso: gej@esperanto.de

Medienecho

Ich bedanke mich herzlich für zugesandte Artikel und Hinweise. Bitte geben Sie bei Mitteilungen einen eindeutig identifizierbaren Absender und einen sinnvollen Betreff an, damit sie nicht im Spam-Ordner landen.

Netzbeiträge, die nur über Angabe persönlicher Daten, per Passwort, kostenpflichtig oder nach Anmeldung zu lesen sind, werden in dieser Zusammenstellung nicht berücksichtigt.

Auf nicht im Netz erschienene Berichte, die mir aber selber vorliegen, wird hingewiesen. Diese sende ich Interessenten gerne als Kopie zum persönlichen Gebrauch (nur per Netzpost) zu. Anfragen an "medienecho@esperanto.de" – Bitte den jeweils genannten Betreff angeben.

15. September 2018

Hinterländer Anzeiger

Sind Städtepartnerschaften noch zeitgemäß?

Immer mehr Menschen in Europa erkennen, dass die Nationalstaaten uns beschränken und beschneiden, anstatt uns zu nutzen. Die Zollgrenzen und Schlagbäume innerhalb der EU sind abgebaut, aber noch nicht die Grenzen in unseren Köpfen. Immer mehr Menschen spüren: Internationalismus ist nichts anderes als ein global aufgeblähter Nationalismus und hat sich längst als untauglich erwiesen, die Probleme der heutigen Menschheit zu lösen. Das haben Esperantisten schon vor dem 1. Weltkrieg erkannt.

https://www.mittelhessen.de/lokales/region-marburg-biedenkopf/leserreporter-region-marburg-biedenkopf-artikel,-Sind-Staedtepartnerschaften-noch-zeitgemaess-_arid,1375890.html

► **Junio 2019**

07 - 10: Deutscher Esperanto-Kongress 209 (Germana Esperanto-Kongreso) en Neumünster (Germanio), en la kongresejo "Kiek in!", Gartenstraße 32. Pliaj informoj ĉe www.esperanto.de/gek2019 kaj <https://www.kiek-in-nms.de>

Julio 2019

06 - 14: 55-aj Baltiajn Esperanto-Tagoj (BET-55) en Panevėžys (Litovio). Litova Esperanto-Asocio afable invitas vin partopreni vicajn ĉiujarajn internaciajn somerajn tradiciajn la 55-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-55). La aranĝo estas dediĉata al la 100-jariĝo de Litova Esperanto-Asocio. Eblas aliĝi rete, sendante la aliĝilon al litova.ea@mail.lt. Reta aliĝilo: http://esperanto.lt/aligxilo_BET.html. Aktualajn informojn pri BET-55 vi povas trovi en la retejo de BET-55 <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET55>.

7. September 2018

Wiener Zeitung – Leserforum

Esperanto ist die beste globale Verkehrssprache

Auf die bei der Globalisierung wichtige Frage, ob wir irgendwann eine Universalsprache sprechen werden, antwortet die Englisch-Professorin Barbara Seidlhofer (in der "Wiener Zeitung" vom 21. August, Anm.): "Dann lernen wir halt alle Chinesisch."

https://www.wienerzeitung.at/meinungen/leserforum/987544_Leserforum.html

4. September 2018

Radio Frei aus Erfurt mit seinem neuen Programm

https://www.radio-frei.de/index.php?iid=1&ksubmit_show=sendung&kunixtime=1536051600

3. September 2018

Quartiersmanagement Richardplatz Süd

Sechstes Sommerfest auf dem Esperantoplatz – beschwingt – kiezorientiert – welttoffen

Ein Punkt des Programmes war Jonny M. Er kommentierte seine engagierten Lieder in Deutsch und erzählte von seinen Esperanto-Reisen als Sänger. "Dankon al miaj plej bonaj amikoj en la mondo", sang er und zählte einige auf. Für beschwingte Musik anderer Art am Anfang und am Ende des Festes sorgte Hartmut Mittag mit seiner Ziehharmonika und mittendrin Alexander Danko mit dem Akkordeon.

http://www.richard-quartier.de/index.php?id=57&tx_news_pi1%5Bnews%5D=275&tx_news_pi1%5Bcontroller%5D=News&tx_news_pi1%5Baction%5D=detail&cHash=000cfa0b9ec0f23f1c2c776a11fae130

21. August 2018

DEWEZET

Nicht Englisch, sondern Esperanto

Zwei Mitglieder der Hamelner Esperanto-Gruppe "Ratkaptista Bando" beim Esperanto-Weltkongress in Lissabon
Wenn sich über 1600 Menschen jeder Altersstufe aus 73 Ländern für eine Woche in einer Weltstadt treffen und alle sprechen die gleiche Sprache, dann könnte das Englisch sein – allerdings nicht auf einem Esperanto-Weltkongress.

https://www.dewezet.de/startseite_artikel,-nicht-englisch-sondern-esperanto-_arid,2483816.html

11. August 2018

Neue Westfälische

Gemeinsame Sprache verbindet

Ein Artikel von Conny Matheus über die Teilnahme am Weltkongress der Esperantosprecher in Lissabon mit Teilnehmern aus 76 Ländern

Eine Kopie des Textes zum persönlichen Gebrauch sende ich auf Wunsch gerne per Netzpost zu: "medienecho@esperanto.de", Betreff: "2018_08_11_uk_lisbono"

7. August 2018

Radio FREI

Esperantosendung aus Erfurt
https://www.radio-frei.de/index.php?iid=1&ksubmit_show=sendung&kunixtime=1533632400

3. August 2018

Neue Osnabrücker Zeitung

Meller Esperantist hat Freunde in aller Welt

Zwar auf dem Territorium der Stadt Melle aber auf einer sprachlich neutralen Ebene fand der Besuch des Japaners Kosaburo Tokiwa bei Manfred Kloweit-Herrmann statt. Beide vereint die Begeisterung, Esperanto zu sprechen.

<https://www.noz.de/lokales/melle/artikel/1416311/meller-esperantist-hat-freunde-in-aller-welt#gallery&0&0&1416311>

7. Juni 2018

Medienanstalt Mecklenburg-Vorpommern

Esperantowelle (aperas regule)

<https://mmv-mediathek.de/sendungen/27-esperanto-welle.html>

2. August 2018

Medienanstalt Mecklenburg-Vorpommern

Esperantowelle

<https://mmv-mediathek.de/play/25368-esperanto-welle.html?toggleHiContrast=true>

2. August 2018

Ostthüringer Zeitung

Familie Henkel aus Braunschwalde liebt Esperanto

Familie Henkel aus Braunschwalde spricht Esperanto. Der kleine Lio, 18 Monate, lernt es gerade zu Hause mit Mama Nguyen Thi Phuong und Papa David. Im Kindergarten spricht der aufgeweckte Knirps Deutsch, mit Oma und Opa natürlich auch. Beide strahlen, wenn der Kleine plappernd auf sie zustürmt. Ist er mit seiner Mutter allein, dann unterhalten sie sich auf Vietnamesisch. Dreisprachig wächst der Kleine auf. Manchmal purzeln die Wörter noch durcheinander. Für Außenstehende ein Wirrwarr, für Lio und seine Eltern Alltag.
<https://schmoelln.otz.de/web/schmoelln/startseite/detail/-/specific/Familie-Henkel-aus-Braunschwalde-liebt-Esperanto-1101537912>

30. Juli 2018

Der Bund

World, shut your mouth

Ob Musik, Werbung oder Wissenschaft – Englisch dominiert die Welt. Das hat auch Nachteile.

Im "Guardian" nennt der polnische Historiker Jacob Mikanowskidas die englische Sprache ein Ungeheuer, einen Tyrannen und einen Dieb...

<https://www.derbund.ch/kultur/world-shut-your-mouth/story/21626169>

5. Juli 2018

Donaukurier- Kindernachrichten

Mi ne komprenas – Ich verstehe das nicht!

Deutsch, Englisch oder Französisch sind Sprachen, die sich über

die Jahrhunderte entwickelt haben. Heute vor 131 Jahren hat der Augenarzt Ludwik Zamenhof in Warschau den Grundstein für Esperanto gelegt, indem er ein kleines Buch dazu herausbrachte.
<https://www.donaukurier.de/extras/kindernachrichten/art71515,3862369>

24. Juli 2018

Thüringer Allgemeine

Esperantofamilien schwärmen von Mühlhausen

Carolin und Robert Weemeyer sind die Organisatoren des Esperanto-Treffens in Mühlhausen. Die Teilnehmer aus zwölf Ländern wohnen bis zum 31. Juli im "AntoniQ". Zum Programm gehört auch das tägliche Singen von Liedern in der internationalen Sprache Esperanto. Foto: Gerald Müller.

<https://muehlhausen.thueringer-allgemeine.de/web/muehlhausen/startseite/detail/-/specific/Esperanto-Familien-schwaermen-von-Muehlhausen-216623733>

21. Juni 2018

Tag 24

Esperanto-Familien treffen sich in Mühlhausen in Thüringen

Eine Sprache, die Menschen in der ganzen Welt verbinden soll: nicht Englisch, Französisch oder Spanisch, sondern die "internacia lingvo" Esperanto.

<https://www.tag24.de/nachrichten/thueringen-muehlhausen-esperanto-treffen-kunstsprache-familien-697811>

21. Juli 2018

RTL online

zum selben Thema

Inzwischen hat nach Angaben des Deutschen Esperanto-Bundes die Sprache in viele Bereiche des Lebens Einzug gehalten. Es gibt Esperanto-Liederbücher, Kochrezepte und Romane werden in Esperanto übertragen und Bands gehen mit ihren Esperanto-Songs auf Tournee.

<https://web.archive.org/web/20180721024409/https://www.rtl.de/cms/esperanto-familien-treffen-sich-in-muehlhausen-4194481.html>

21. Juli 2018

Aktuelle

Zum selben Thema

<http://derstandard.ddnss.de/nachrichten/esperantofamilien-treffen-sich-in-muehlhausen>

20. Juli 2018

Frankfurter Allgemeine

zum selben Thema

<http://www.faz.net/aktuell/gesellschaft/menschen/esperanto-treffen-in-muehlhausen-in-thueringen-15701525.html>

19. Juli 2018

Focus

zum selben Thema

https://www.focus.de/regional/thueringen/gesellschaft-thueringer-familie-bei-esperanto-treffen-in-muehlhausen-dabei_id_9279980.html

Du sinsekvaj aranĝoj en Ĉeĥio kun aŭstra veterano

En aŭgusto okazis en Ĉeĥio tri Esperanto-aranĝoj. Post la solenaĵo de la 85-a datreveno de la Esperanto-klubo Svitavy sekvis senpere du paralelaj okazaĵoj, nome Internacia Esperanto-Lernejo en Bartošovice kaj Ekumena Kongreso en Poděbrady.

Mi elektis post Svitavy daŭrigi mian esperantumadon en la Ekumena Kongreso, kio allogis ankaŭ mian multjaran amikon, 93-jaran aŭstran Esperanto-veteranon Martin Stuppniĝ; aŭtoron de la sukcesa verko *Home en senhometo*, kies unua eldono de 300 ekzempleroj elĉerpiĝis jam post malpli ol 2 jaroj. Tio estas efektive miraklo koncerne Esperanto-librojn. Tial mi realigis per mia eldonoj KAVA-PECH la 2-an eldonon, kompletigitan per mia antaŭparolo (pri la aŭtoro) kaj lia postparolo, fakte petita de la legantoj, nome kiel iris lia vivo post la milito. Kaj tiun libron mi prezentis ene de ambaŭ aranĝoj, post kio Martin diligente subskribadis ĝin al pluraj aĉetintoj. La libron *Home en senhometo* kaj ĉiujn ceterajn librojn eldonitajn de KAVA-PECH vi povas aĉeti en multaj libroservoj aŭ rekte ĉe <http://kava-pech.cz/esperanto>.

La germanan originalon *Kriegsimpressionen* esperantigis ne Martin Stuppniĝ, sed la hungara profesia tradukisto el la germana, Jozefo Horváth. Decas do klarigi, kial ne faris tion la aŭtoro mem, ja perfekta esperantisto. Pri tio kulpas lia okulmalsano, pro kiu li ne plu povas rigardi ekranon pli longe ol kelkajn minutojn; sufiĉaj por komuniki per retmesaĝoj, sed ne plu por verki aŭ traduki libron.



Neformala babilado en la Esperanto-muzeo: apud Martin sidas prezidantino de ĈEA Libuše Hýblová

Iom pri la aranĝoj: La solenaĵo en Svitavy havis tre riĉan kulturalan programon kun bunta internacia partoprenantaro. Bele koncertis Anjo Amika el Hungario kaj Jana Muzetskaja el Rusio, te-ceremonion prezentis Zhang Ping (Ĝoĵa) el Ĉinio. La tuta programo estis vive prezentata ĉe jutubo. Kiu ne sukcesis ĝin sekvi en la reala tempo, povas rigardi ĝian registraĵon. Sufiĉas serĉi ĉe <http://youtu.be> la vortojn Svitavy, Esperanto kaj al tio aŭ Anjo, aŭ interkona vespero, aŭ Ĝoĵa.

El Svitavy mi veturis al la Ekumena kongreso kune kun Martin en la banlokon Poděbrady. Ĝin ĉeestis 78 partoprenantoj el 14 landoj kaj diversaj eklezioj (romkatolika, grekkatolika kaj pluraj protestantaj). Krom la kutimaj matenaj kaj vesperaj preĝoj kaj diservoj (kaj katolikaj mesoj) okazis multaj prelegoj, ne ĉiam ligitaj al teologio. Mi ekzemple prezentis du prelegojn, pri la vivo kaj verko de Francisko Valdomiro Lorenz, kaj pri komunaj misioj de Komenio kaj Zamenhof. Krom tio okazis ankaŭ tre interesaj ekskursoj. El ili por mi, eldonisto, estis la plej interesa historia librobindejo en Rožďalovice, por aliaj sendube ĉevalbredejo en Kladruby nad Labem aŭ la historia urbo Kutná Hora (registrita en la listo de kulturaj heredaĵoj de Unesko). Necesas ankaŭ menciigi la kulturajn posttagmezojn; dum unu kantis la solisto de la ŝtata operejo en Prago Richard Haan Bibliajn kantojn de Antonín Dvořák kaj lia edzino,



Martin kun la ĉefino de Esperanto-muzeo en Svitavy Libuše Dvořáková



Martin alparolas partoprenantojn de la ekumena kongreso. Apud li estas prezidanto de KELI Philippe Cousson



Japanaj partoprenantinoj de la kongreso prezentas mallongan teatraĵon

solistino de la praga teatro Semafor kaj filino de la bone konata operkantisto kaj esperantisto Miroslav Smyčka, Jolana Haan Smyčková, kantis ankaŭ du kantojn en Esperanto. Aliaj posttagmezon oni povis ĝui la lokan Kantĥoron de S-ta Cecilio.

Sed reen al Martin Stuppnig: Li ne aliĝis kun iu speciala prelego aŭ alia programero, tamen li apartenis ambaŭloke al la plej admirataj ĉeestantoj. Ne nur pro siaj interesaj kaj trafaj intervenoj, sed oni admiris ĉe li ankaŭ liajn daŭrajn junecajn aspekton kaj pensmanieron. Sed kiel li malkaŝis en neformala babilrondo, tio ne estas hazardo, li faras por tio multon. Ekde juneco li seninterrompe ĉiumatene gimnastikas (minimume "kvin tibetanojn"*), al kio li ĉiam ion aldonas) kaj ĉiutage li vigle piediras minimume 5 kilometrojn. La gimnastikadon li neniam ellasas, eĉ kiam li estas survoje, kio ja ĉe li oftas. Krome li ankaŭ estas plu publike aktiva, iras de iu tasko al alia, per kio li ekzercas ankaŭ sian cerbon.


Kion aldoni? Mi kun admiro publike deziras al mia amiko Martin Stuppnig, ke lia nekredbla korpa kaj spirita juneco daŭru ankoraŭ multajn jarojn kaj portu al li ankoraŭ multan ĝojon, kompreneble ankaŭ per kaj por Esperanto.

Teksto kaj fotoj: Petro Chrdle, www.kava-pech.cz

*) Populara aro da kvin gimnastikaj rutinaĵoj, kiuj devus havi sanigan efikon kaj al la korpo kaj al la spirito de la homo.



La kongreso: vespera amuziĝo en la klubejo post fino de la programo



Jolana Haan
Smyčková
post la koncerto

Kriegsimpressionen – zweite Auflage

Viele Leser von Martin Stuppnigs Werk in Esperanto Homo en senhometo und auch die, die sich noch nicht zutrauen ein umfangreicheres Buch in Esperanto zu lesen, bedauern, dass die deutschsprachige Ausgabe nicht mehr verfügbar ist. Deshalb entschied ich mich, die zweite Auflage des Buches – erweitert um die Anhänge, die ich für die Esperantosprachige Version verfasste – in meinem Verlag KAVA-PECH herauszugeben. Es wird sich sich um eine kleine, schöne und gebundene Auflage handeln, deren Preis daher etwas höher, aber immer noch günstig sein wird: 18 €. Das Buch werde ich noch dieses Jahr veröffentlichen, spätestens aber im Jänner 2019.

Um die Auflagenhöhe entsprechend planen zu können, bitte ich Interessierte um ihre Vorbestellungen. Nach Erscheinen wird das Buch um 18 € plus 6 € Versandkosten, also insgesamt 24 €, verschickt (die tatsächlichen Versandkosten sind höher). Wer das Buch schon vor Erscheinen bezahlt, erhält es um 18 € inklusive Versand zugesendet.

Sollten Sie Interesse an Martin Stuppnigs Kriegsimpressionen haben, kontaktieren Sie mich bitte über E-Mail.

Petro Chrdle, Verlag KAVA-PECH,
chrdle@kava-pech.cz

Vera rakonto de la avino Fidan



Foto: Uwe Stecher

Franciska Dodik el Vieno sendis al ni mallongan rakonton de ŝia amikino el Bulgario, el la 1940-aj jaroj; bonvolu ne heziti ankaŭ vi sendi vian kontribuojon.

Io vekis min, mi ne scias kio, mi nur sentis, ke mia patrino denove ne estis hejme. Ŝi iris fari siajn aferojn en la urbo, pri kiuj ŝi nenion rakontis al mi.

Mi ne sentis min bone, kiam ŝi forlasis tiel frue la domon, sed mi sciis, ke ŝi denove venos.

Ni vivis en montara vilaĝo, ĉirkaŭita de belega naturo, sed niaj proksimaj najbaroj loĝis tre malproksime de ni.

La vivo kun mia patrino tute ne estis facila, ŝi havis kelkajn problemojn, kiujn mi ne komprenis, kaj ŝi multe drinkis.

Mia patro, miaj fratinoj kaj mia frato vivis en Germanio kaj mi vivis kun mia patrino en Bulgario.

De tempo al tempo vizitis nin mia patro, kaj miaj gefratoj venis somere, aŭ tute malofte en alia jartempo.

Mi estis tre trista infano, ĉar mi vidis ofte, ke mia patrino ne fartas bone.

Mi faris ĉion, kion mi povis, por helpi al ŝi kaj por plifaciligi ŝian vivon.

Aŭtune kaj vintre mi kolektis disfaligitajn branĉojn por hejti (ni havis malnovan modestan kuirilon) kaj mi ofte zorgis pri niaj bestoj.

Ni havis porkojn, kokidojn kaj hundojn.

En niaj bestoj mi trovis amikojn, kiujn mi ne havis inter homoj, kaj en la naturo mi trovis konsolon.

Niaj proksimaj najbaroj estis bonaj homoj, ni vizitis ilin ofte, kaj ili havis ĉiam ion bonan por manĝi.

Mi ŝatis trinki acidan lakton, kiun nia najbarino mem faris.

La unusola afero, kiu mi ne povis akcepti estas tiu: Mia patrino ricevis ĉiam unu grandan botelon da brando, kiun ili ankaŭ mem produktis.

Foje mi demandis nian najbarinon, kial ili faras tion, sed ŝi rigardis min nur triste, kaj mem ne sciis kion diri.

Zamenhof-Fest in Wien am Samstag, den 08.12.2018

Das traditionelle Zamenhof-Fest des Österreichischen Esperanto-Verbandes findet auch dieses Jahr wieder im Polnischen Institut, Am Gestade 7, 1010 Wien statt.

Das genaue Programm wird auf www.esperanto.at noch bekanntgegeben werden. Es erwarten uns verschiedene Vorträge über Esperanto und internationale Gäste und Vortragende; anschließend sorgt ein Buffet für Stärkung und bietet sich Gelegenheit zum Informationsaustausch und Knüpfen oder Auffrischen von Bekanntschaften.

Es würde uns sehr freuen, Esperanto-Sprecher und Interessierte beim Zamenhof-Fest begrüßen zu dürfen. Der Eintritt ist frei.

Postprimico

Jen fotoj el la festo post la meso en Esperanto de Albert Reiner, el la antaŭa numero.





deutsche
esperanto
Jugend

La 74-a IJK de TEJO



Foto: Ariel Palmer

okazis en la urbo Badajoz (Hispanio), ĉe la landlimo kun Portugalio, de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2018. Kunorganizis ĝin Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS) kaj Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ).



deutsche
esperanto
Jugend

Deutsche Esperanto-Jugend e.V.
Katzbachstraße 25
10965 Berlin

Braunschweig, den 12.09.2018

Hallo Liebes Mitglied,

wir möchten dich ganz herzlich einladen zur

Jahreshauptversammlung der Deutschen Esperanto-Jugend e.V.

Diese findet statt am 31.12.2018 um 11:00 im JES-ejo, Hirschluch 1, 15859 Storkow (Mark)

Dabei erwarten dich die folgenden spannenden Punkte:

TOP 1 Eröffnung; Wahl des Versammlungsleiters, des*der Wahlleiter*in und des*der Protokollführer*in; Feststellung der Stimmberechtigung; Ergänzungswahl

TOP 2 Abstimmung über die Tagesordnung

TOP 3 Vorstands- und Kassenbericht mit anschließender Diskussion

TOP 4 Bericht der Kassenprüfer*innen

TOP 5 Entlastung des Bundesvorstandes

TOP 6 Wahl des Bundesvorstandes und der Kassenprüfer*innen

TOP 7 Arbeitsplan und Haushalt für das kommende Jahr, Wahl von Ausschüssen

TOP 8 Satzungsänderungen

TOP 9 Verschiedenes

TOP 10 Entscheidung über Ort und Datum der nächsten Hauptversammlung

TOP 11 Schließung der Sitzung

Wie immer laden wir euch herzlich ein, nicht nur an der Jahreshauptversammlung, sondern auch am drumherum stattfindenden JES teilzunehmen. Meldet euch an unter jes.pej.pl/eo/jes2018/partopreno/aligilo/ und feiert Silvester gemeinsam mit Esperantist*innen aus aller Welt.

Wenn du aktiv werden willst, um im Verein etwas zu bewegen, werde Mitglied eines

Ausschusses, der dein Interessengebiet vertritt (TOP 7).

Oder hast du Lust in den Vorstand gewählt zu werden, weißt aber nicht, was da so auf dich zukommt? Kein Problem, melde dich einfach bei Michaela (michaelastegmaier@freenet.de), Lars (larsthomashansen@gmail.com) oder Julia (julialeonore@gmail.com).

Der Vorstand stellt die folgenden Anträge an die Versammlung:

In § 2 Abs. 5 der Satzung soll hinzugefügt werden: "die Förderung von Kunst und Kultur, indem wir zu unserem jährlichen Silvestertreffen JES Künstler einladen, die ihr Wissen in Workshops an die Teilnehmer weitergeben".

Begründung: Auf Antrag der Mitgliederversammlung vom 31.12.2016

In § 7 Abs. 1 der Satzung soll hinzugefügt werden: "Mitglieder des Bundesvorstandes verbleiben gegebenenfalls mehr als zwei Jahre im Amt, bis bei der nächsten Mitgliederversammlung neue Wahlen durchgeführt werden oder ein Rücktritt stattfindet".

Begründung: Nach dem die Mitgliederversammlung beim IJK 2015 außer der Reihe im Sommer stattfand, lief die Amtszeit zweier Vorstandsmitglieder im August 2017 aus und eine Neuwahl war zu diesem Zeitpunkt nicht möglich. Um solche Situationen zu vermeiden, soll die Amtszeit bis zur nächsten Mitgliederversammlung weiterbestehen.

Es freut sich auf dich
Der Vorstand

Sommer, Sonne, Sonnenschein

Hóla die Waldfee - Das diesjähriĝe IJK in Badajoz (Spanien) war ein Hitzehammer. Die Woche über herrschten Temperaturen bis zu 45 Grad. So verbrachten wir die meiste Zeit im hauseigenen Pool oder in einem der klimatisierten Räume.

Außerdem gab es typische Programmpunkte wie Esperanto für Anfänger und Fortgeschrittene, Poesie, Jogakurse, Tanzen, Capoeira und Aikidō.

Am ersten Abend ging es – trotz Hitze – in die Stadtmitte, wo das Kultur-Lingva Festivalo stattfand. Nachdem sich alle mit argentinischem Mate, deutschen Gummibärchen und slovakischen Spirituosen eingedeckt hatten, rockte Martin Wiese mit seiner E-Gitarre den Marktplatz. Am nächsten Tag sorgte eine Wasserschlacht für Abkühlung und zur Abendstunde wurden Filme gezeigt. Am Tag darauf folgte ein Ganztagesausflug, bei dem man sich für die römischen Monumente der Stadt Merido, einem Wasserpark oder einer Besichtigung der Grenze zu Portugal entscheiden konnte. Danach gab es mit besinnlicher Gitarrenmusik von Timothy Gallego einen Moment, um sich vom Tag auszuruhen. Jeder, der danach noch Kraft in den Beinen übrig hatte, konnte sich freuen: Ab heute organisierten die Veranstalter jede Nacht eine Disko, die selten vor 4 Uhr morgens endete.

„Utopio“ war der Name des skurrilen, aber einzigartigen Theaterstücks, das am darauffolgenden Abend aufgeführt wurde. Der Hauptdarsteller, ein betrübter Clown, konnte das Publikum so sehr rühren, dass am Ende sogar die kleineren Kinder des Treffens ungeplant die Bühne stürmten, um dem Protagonisten beizustehen. Zurecht bekam der Auftritt Standing Ovations. Gekrönt wurde der Tag mit der Karaoke.

Für den spanischen Flair kümmerte sich die Gruppe Cira y Ulises, die mit Percussion, Gitarrenklängen und kräftiger Frauenstimme überzeugte. Der nächtliche „Astronomische Spaziergang“ haute allerdings aufgrund des zu hellen Nachthimmels niemanden vom Hocker.

Der letzte Tag war vollgepackt mit Tanzkursen, Debatten und Ateliers. Der Abschlussabend startete mit dem Internacia



Vespero, bei dem jeder Teilnehmer in ein paar Minuten ein Lied, Tanz oder sonstiges Kulturgut aus seinem Land aufführen konnte. Dieser Programmpunkt war sehr beliebt, denn auch er zog sich bis in die Nacht hinein. Obwohl das Konzert von Jonny M erst um Mitternacht begann, heizte er dem Publikum ordentlich ein. Zum Glück holte trotz diesbezüglicher Bedenken kein Nachbar die Polizei. Danach verlegten wir das Tanzparkett wieder in die Disko. Ins Bett gingen in dieser Nacht nur die wenigsten. Die meisten Teilnehmer schleppten sich am nächsten Tag nach wehmütigen Verabschiedungen in ihre Busse und schliefen dort für ein paar Stunden. Ich verbrachte noch einen Tag in Sevilla und flog dann zurück in das doch etwas kühlere Deutschland.

Jonas Marx

Printempo, maro kaj itala etoso – IJF en Marina di Ascea!

Al kiu aranĝo logas vin printempo, bela naturo kaj la maro? En kiu aranĝo vi neniam scias kiam la (tamen bongusta) manĝo finfine aperas?

En kiu aranĝo estas varme ekstere kaj malvarme ene? Ĝuste! Temas pri IJF – Internacia Junulara Festivalo en Italio!

Ĉirkaŭ pasko, fine de marto, kunvenis en Marina di Ascea en suda Italio ĉirkaŭ 50 homoj, junaj kaj junaj en la koro, por kune pasigi bonan tempon en tre bela ĉirkaŭaĵo. Kiam



en multaj partoj de Eŭropo ankoraŭ estis aĉa vintro, en suda Italio jam plene regis varma printempo kun sia tuta beleco kaj agrableco. Nia domaro estis ĉirkaŭita de florantaj montetoj kaj nur iom grimpite supren jam bele videblis la maro.

Konsiderante tiajn ĉi kondiĉojn kompreneblas, ke ne vere ĝenis, ke la oficiala programo nek estis tiom serioza nek tiom plena. Krom kelkaj prelegoj okazis dumtage trejnado pri egaleco kaj alireblecoj, en kiu kreskis multaj indaj ideoj por aliaj venontaj aranĝoj. Vespere ne mankis tradiciaj programeroj kiel trinko-manĝa nokto kaj internacia vespero. Furoris tamen nekutimaj novaĵoj – opera koncerto kaj popolmuzika koncerto, kiuj ofertis al ni tre malsamajn, sed bongustajn impresojn de la lokaj suditala muziko kaj kulturo.

Dum la nokto la drinkejo kaj dancejo estis la taŭgaj adresoj por elspezi stelojn (Esperanto-mono) kaj la energion, kiu restis post la aktivajoj de la tago.

El la programo aparte menciindas la ekskursoj. Okazis ekskursoj al romiaj temploj, la vulkano Vezuvio kaj al pliaj vidindaĵoj en la naturo – arbaraj montetoj kun belegaj ĉirkaŭidoj, la plaĝo, kie ondetoj kaj ondegaj disbatiĝis ĉe diversaj ŝtonoj kaj kie moŝte levigantaj krutaĵoj tuj apudis.

La manĝoj, kiam ili finfine aperis, laŭis la kliŝon pri Italio kaj estis treege bongustaj. Niaj gastigantoj sukcesis prezenti al ni diversajn lokajn specialaĵojn.

Finfine, kvankam la aranĝo ne estis tiom ege organizita, la etoso estis sufiĉe agrabla. Ja estis tiaj detaloj kiel ekzemple unue manko de akvoboligilo en gufujo kaj la neniam fidindaj horoj de vesperaj programeroj kaj manĝoj. Sed bonŝance (aŭ fakte, bedaŭrinde?) la kelkfoja manko de organizado sufiĉe kongruis kun la atendoj de la partoprenantoj kaj eĉ kelkaj organizantoj...

Resume – se vi ŝatas seriozan, kongresecan aranĝon kun vasta programo, ne iru al IJF. Se vi tamen ja ŝatas feriumadon en bela naturo, agrablan etoson en rondo de Esperantaj amikoj, nepre venu – al Internacia Junulara Festivalo en Italio.

David Mamsch

Estontaj okazaĵoj de GEJ – Germana Esperanto-Junularo



deutsche
esperanto
Jugend

KEKSO

12-a ĝis 14-a de oktobro
KEKSO en Heidelberg
Gastigas la Bavelo-Seminario
Aliĝu nun en nia retejo!

16-a ĝis 17-a de novembro 2018

Expolingua en Berlino
Ni helpos prizorgi la Esperanto-standon de
GEA dum la evento
Aliĝu ĉe Michaela (michaelastegmaier@freenet.de)

EXPOLINGUA
Berlin

28-a de decembro 2018 ĝis 4-a de januaro 2019

Junulara E-Semajno en Hirschluch in Storkow

JES
Junulara
E-Semajno

Organizas ĝin GEJ kaj PEJ kaj ni kore invitas
vin festi en la novan jaron kun ni. Krome
okazos la membrosambleo de GEJ kun
planado de la nova jaro kaj elekto de nova
estraro. Do se vi interesiĝas pri nia agado aŭ
eĉ pri iĝi estrarano ne hezitu kontakti nin.

Antaŭanonco:

La 25-a KEKSO okazos en Neumünster inter la 7-a kaj 10-a de junio 2019. Festu
kun ni la etan jubileon kaj enmiksiĝu en la programon de GEK: ni volas oferti
mojosajn programerojn por kaj novuloj kaj maljunuloj kaj bezonas vian helpon!

Jonas Scheerschmidt



Mi kreskis proksime de la Esperanto-urbo Herzberg am Harz kaj ĉiam miris, kiom ekzakta Esperanto estas. Lun tagon mi estis en la Esperanto-centro en Herzberg kaj tuj entuziasmiĝis pri la planita lingvo Esperanto. Kion mi tre aprezas, estas multaj internaciaj kunvenoj, kie vi povas renkonti homojn de ĉie en Eŭropo kaj ĉirkaŭ la mondo.

Pro tio, kaj ĉar mi ankaŭ tre interesiĝas pri eksterlandaj aferoj kaj internacia politiko kaj estas konvinkita eŭropano, mi aliĝis al Germana Esperanto-Junularo.

Mi pensas, ke Esperanto havas grandan estontecon kiel monda lingvo kaj mi ankaŭ pensas, ke ni povas konvinki multajn homojn, ĉar ĝi estas neŭtrala kaj tre simpla lingvo. Pro tio mi iros al la „Expolingua“ en Berlino kaj helpos ĉe la Esperanto-stando. Ĉu ankaŭ vi venos por subteni nin?

**Die DEJ ist jetzt unter
@esperantojugend
auf Instagram zu
finden!**



**Du willst aktiver
werden? Dann komm
auch in unsere „GEJ
aktivuloj“-Gruppe bei
Telegram**



**[https://t.me/joinchat/
Cx7iZQ9Nk8AuCZj68VEr3g](https://t.me/joinchat/Cx7iZQ9Nk8AuCZj68VEr3g)**

Kofi Annan al UK en Berlin 1999

La morto de Kofi Annan instigas menciin la rilaton de li, kiel Ĝenerala Sekretario de UN al Esperanto.

En la mesaĝo al la 84-a UK en Berlin en 1999 (en angla lingvo) lia lasta frazo estis en Esperanto “En tiu spirito, mi deziras al vi plenan sukceson” kaj Osmo Buller (Ĝenerala Direktoro de UEA) memoras, ke li ricevis fakson, per kiu Annan petis la tradukon.

Estas certa progreso, ĉar Aleksej Salomatov rimarkis en “La Ondo de Esperanto. 1997. №5 (36)” pri la kongreso en Adelajdo (Aŭstralio, 19–26 jul 1997) “Kofi Annan, ĝenerala sekretario de UN, sendis al la kongreso salutmesaĝon, en kiu li sukcesis ne menciin la vorton “Esperanto”, krom en la nomo UEA.”

La Mesaĝo de la Ĝenerala Sekretario de UN al la 84-a UK en Berlin:

“Kun plezuro mi sendas bondezirojn al la 84-a Universala Kongreso de Esperanto. Vi kunvenas je la fino de tumultaj jarcentoj, kiu atestis je la pintoj kaj la abismoj de la homaj kapabloj. Multaj mondaj evoluoj rajtas ankoraŭ nin dubigi kaj maltrankviligi. En unu regiono disvastiĝas paco, en alia ekfuriozas genocido. Sen-egala lukso apudas teruran malriĉon — la staton, en kiu restas kaptita kvarono de la monda loĝantaro. Tutmondigo nin enretigas ĉiam pli dense, dum maltolero nin plu disigas. Ĉiu progreso estas necerta; la defioj, kiujn ni frontas, fariĝas ĉiam pli kompleksaj.

Hodiaŭ la monda tagordo postulas de la ŝtatoj novajn ideojn, novajn rimedojn, novajn politikajn engaĝojn. Pli kaj pli ofte montriĝas, ke la problemoj komunaj. Inter la minacoj troviĝas kelkaj bone videblaj: terorismo, tutmondaj epidemioj, amasarmado. Aliaj insidas kaŝe: klimata ŝanĝo, narkot-komerco, la “lavado” de ŝtela mono. Ĉiuj ignoras landlimojn; ili estas “problemoj sen pasportoj”. Neniu lando sola kapablas ilin forbari. Tial ĉiu lando bezonas Unuiĝintajn Naciojn.

En tia ĉiam pli interplektita mondo, konstrui la pacon — kaj batali kontraŭ minacoj al la paco — postulas la partoprenon de ĉiu civitano kaj ĉiu lando. Diversmaniere kontribuas al tio la registaroj, ne-registaraj organizoj, komercaj entreprenoj, akademijaj institucioj, sindikatoj, virinaj asocioj kaj multaj aliaj. En la lastaj jaroj, tiaj diversaj fortoj de la civila socio — la socio, en kiu neniu rajtas sola kaj senkontrolite decidi pri komunaj aferoj — montris sin ĉiam pli aktivaj je la nacia kaj internacia skaloj. Tio estas tre pozitiva evoluo, ĉar ĝi helpas respondeciĝi la registarojn kaj instigas homojn al kundedecado pri temoj, kiuj rekte tuŝas iliajn vivojn.

Ĉe Unuiĝintaj Nacioj, ĉiuj ĉi kunrolantoj povas kuniĝi en komuna klopodo: por ekologia sekureco, por homaj rajtoj,



por justeco, kaj tiel plu. UN daŭre prezentas malfermitan pardonon al vivinda estonteco, praktikan forumon por la efika kunsolvado de mondaj problemoj, surbaze de la universalaj idealoj listigitaj en la Ĉarto. Kiel instruas afrika proverbo: “La Teron ni ne posedas, sed prizorgas por la posteuloj”. Je ĉi tiu historia momento, plena de esperigaj ebloj, mi dediĉis min al la konstruado de nova fundamento el paco, progreso kaj evoluo, en la kadro kaj per la helpo de Unuiĝintaj Nacioj. Tian devon, al la nuntempo kaj la estonto, nun frontas ni ĉiuj. En tiu spirito, mi deziras al vi plenan sukceson.”

En *La Ondo de Esperanto*. 1999. №8–9 (58–59) troviĝis tre favora raporto de Halina Gorecka pri la kongreso en Berlin. Supzeble ŝi partoprenis 2018 la Zamenhof-Feston en Berlin. Ŝi skribis:

“La kongreslando kaj speciale la kongresurbo grave influas la programon de UK, kvankam unuavide ĝi estas tradicia. Ĉi-foje aparte sukcesaj estis esperantologia konferenco, terminologia kunveno kaj Nitobe-simpozio. Krom la multaj fak-kunvenoj, menciendas fak-ekskursoj; ekzemple, fervojistoj vizitis grandan fervojo-konstruejon en la centro de Berlino, kaj IKEF (komerco kaj ekonomio) organizis viziton de Humboldt-Universitato kaj de la Komerca Ĉambro.

Bona ideo pri la kulturetaĝo Forge ebligis en neformala etoso ĝui multajn muzikajn prezentojn. Klasika muziko ĉefrolis, kaj mi konvinkiĝis pri la praveco de la fama Berlina melodio “Berlinanoj ŝatas muzikon”. La plaĉe kunmetita programo de la Nacia vespero, kiun lerte gvidis Martin Haase, lumbilde konatigis la kongresanojn kun la urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo, dum alternis muziko, kantoj kaj dancoj. Plezurigis min satira citaĵo de Kurt Tucholski pri Berlino kaj du kanzonoj de Bertold Brecht plenumitaj de Barbara Kellerbauer germane kaj Esperante. Cetere, enirante en la salomon ĉiu ricevis la programon de l’ vespero, kiu helpis bone sekvi la erojn kaj konservi ilin en la memoro.”

Estas tamen menciinda, ke malgraŭ ŝia pozitiva prezento de la reago de amaskomunikiloj, la Esperanto-Movado en Berlin ne profitis de la kongreso.

Ne nur en berlinaj gazetoj aperis pozitivaj artikoloj, sed ankaŭ en multaj tutgermanaj ĵurnaloj, cetere en la tre renomata *Der Spiegel*. La 29-an de julio en la urbodomo de Berlino okazis gazetara konferenco kun 25 venintaj ĵurnalistoj, kaj ne malpli ol dudeko da aliaj venis por peti informojn ĉe la kongresa gazetara servo.

Roland Schnell

ZEO-fotokonkurso en la Vikimedia Komunejo



La Vikimedia Komunejo (VK, angle: *Wikimedia Commons*) estas la komuna bild-datenbanko de la diverslingvaj vikipedioj.

Lam ĉiu vikipedio devis mem konservi ĉiujn uzatajn bildojn, do ofte unu sama foto ekzistis multoble por diversaj lingvo. Sed jam de jaroj la vikipedioj uzas precipe la Komunejon por stori siajn bildojn, videofilmojn kaj sonojn.

VK regule organizas konkursojn por instigi uzantojn al la disponigo de pliaj bildoj. Dum la monato aŭgusto 2018 unuafoje okazis konkurso organizita de la grupo "Esperanto kaj libera scio", sub la temo "Vikio amas ZEOjn 2018". Ĝia celo estis alŭtigi fotojn pri ZEO-j, Zamenhof-Esperanto-Objektoj, do ekzemple monumentojn pri Zamenhof aŭ stratojn nomitajn laŭ Esperanto.

Krom la tri ordinaraj premioj (150 / 100 / 50 dolaroj por la tri plej bonaj bildoj) estis pluraj specialaj premioj, ekzemple por la plej bona historia foto de ne plu ekzistanta ZEO kaj la plej bona foto de ankoraŭ ne listigita ZEO. Aldonajn premiojn sponsoris UEA, por la respektive plej bonaj fotoj el ĉiu el la kvin kontinentoj (oni prave ne atendis foton el Antarktio).

La unuan premion gajnis foto de Zamenhof-monumento (aŭtoro Fotanto) en la litovia urbo Veisiejai. La premion de la publiko ricevis foto de la varsovia lu-bicikla sistemo "Veturilo" de Michal Matúšov. La premio pri ne plu ekzistantaj ZEO-j ne povis esti aljuĝita pro manko de kandidatoj.

Kvankam la organizantoj deklaris, ke ili "akceptas vastasence fotojn rilatajn al Esperanto, ties kulturo kaj kreinto", en la fina listo de 30 pintaj fotoj aperas preskaŭ nur fotoj de Zamenhof- kaj Esperanto-monumentoj kaj stratoj aŭ placoj nomitaj laŭ Zamenhof aŭ Esperanto. Eŝceptoj estas kristana preĝejo kun dulingvaj mozaikoj (Esperanto/itala) kaj la domo en Sibio (Rumanio) de Renardo la Vulpo, kie Andreo Cseh faris siajn unuajn lecionojn. Fotoj de Esperanto-aranĝoj ne estas inter la premiitaĵoj, kvankam celo de la konkurso estis "dokumenti la heredaĵon de Esperantujo", kiu ja konsistas ne nur el monumentoj.

Danke al la konkurso VK nun disponas fotojn de pluraj dekoj da ZEO-j, pri kiuj antaŭe ne estis materialo. Kromefiko, supozeble dezirata, estis atentigi la VK-kunlaborantaron pri la ekzisto de Esperanto. Efektive pluraj fotoj supozeble venis de ne-esperantistoj, se juĝi laŭ la lingvo(j) de la bildpriskriboj. Sed ankaŭ la inversa varbefiko, pri VK inter esperantistoj funkciis, ĉar pluraj partoprenantoj unuafoje kontribuis al VK.

Adreso de la listo de la pintaj 30 bildoj: https://commons.wikimedia.org/wiki/Commons:Wiki_Loves_ZEOs_2018/Winners. La fotoj estas sub la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda. **Renardo Fössmeier**

